

# INTERNACIA PEDAGOGIA REVUO

(I. P. R.)

OFICIALA MONATA ORGANO DE

— Internacia Asocio de Instruistoj. (I. A. I.) —

JARA ABONO : Sm. 1.500 — Senpaga por la membroj de I. A. I.

Membra kotizaĵo por 1 jaro	}	ordinara membro	1 Sm.
(La asocia jaro komencas la		membro - propagandulo	4 Sm.
ian de Aŭgusto)		membro - donaculo	10 Sm.

N. - B. — I. A. I. ankaŭ akceptas dankeme ĉiujn donacojn, kiuj helpas ĝian agadon.

## Tarifo pri anoncoj.

Por unufoja enpresado :

1/1 paĝo	Sm. 16		1/8 paĝo	Sm. 3,200
1/2 paĝo	Sm. 10		1/16 paĝo	Sm. 2
1/4 paĝo	Sm. 6			

Malgrandaj anoncoj nekomercaj Sm. 0,200

Rabato por 3-foja enpresado	10 %
» » 6-foja »	20 %
» » 12-foja »	30 %

N. - B. — La membroj de I. A. I. pagas nur je duonprezo, krom la rabato, ĉiujn anoncojn.

*Avizoj de la Redakcio.* — Nepresitajn manuskriptojn ni resendadas nur tiam, se oni aldonis poŝtpagon por resendo. — La redakcio konservas por si la rajton korekti laŭ bezono la manuskriptojn. — Represoj kaj tradukoj de niaj artikoloj estas permesataj, se ili ne estas speciale rezervitaj ; sed oni ĉiam citu nian revuon kaj sendu al ni almenaŭ 2 ekzemplerojn de la tradukaĵo. — En la fako « Bibliografio » estos registrataj nur tiuj gazetoj aŭ libroj, en kiu ajn lingvo, de kiuj venis almenaŭ 2 ekzemplerojn. — La redakcio respondas letere aŭ poŝtkarte nur tiam, se oni aldonis por la respondo internacian respondkuponon aŭ respondkarton.

REDAKTORO - ADMINISTRANTO

Sro JAN JACOBS, kasisto de I. A. I.

BOOMSCHÉ STEENWEG 444, ANTWERPEN — BELGIJO.

**LUEBLA**

## En organizo estas vivo kaj forto.

Okaze de la VIII esper. kongreso en Krakovo oni povis denove konstati, ke sufiĉe ĝranda procento da partoprenintoj estas la ĝeinstruistoj de ĉiuj eblaj lernejoj kategorioj.

Tiu ĉi fakto nerefuteble pruvas, ke ni instruistoj havas ne nur plenan ekkomprenon pri la alta socia ideo, kies nomo estas « esperantismo », sed ke ni ĉiuj samtempe serĉas vojojn, kiuj nin reciproke interligas kaj alproksimigas.

Estas certe tre dezirinde, ke la instruistoj de la tuta mondo reciproke alproksimiĝu kaj konatiĝu, ĉar el nia reciproka alproksimiĝo rezultas tre gravaj profitoj

Antaŭ ĉio, dank'al nia reciprokeco, organizo kaj solidareco, ricevos grandan profiton kaj antaŭenpuŝon nia ideo movado esperantista, poste profitos ankaŭ treege nia profesio kaj sociala situacio, kaj dank' al tio la signifo de l'instruisto ĉe kiu ajn popolo tiom pli alten leviĝos.

Ni instruistoj estas ja anoj de unu ĝranda, komuna familio ĝeinstruista. Tute ĝuste diris en la 5a numero de I. P. R. el la lasta jarkolekto kolego sinjoro MARÉCHAL en sia «Alvoko», adresita al la tutmonda ĝeinstruistaro, ke ni ĉiuj havas la samajn celadojn, samajn sopirojn, la samajn malkuraĝigojn kaj dolorojn. Ĉiu el ni oferas volonte siajn fortojn al la popolo, al kiu li apartenas, ĉiu el ni faras oferdone sian malfacilan laboron edukadan kaj instruadan sciante, ke li faras laboron plenan da respondeco sed samtempe laboron nemezureble valoran.

La popolo metas en niajn manojn sian plej karan trezoron, sian infanaron, ĝejunularon; en niajn manojn ĝi metas la tutan zorgon pri la spirita kaj edukada progresoj de la infanaro kaj samtempe eĉ iagradan zorgon pri ĝia kapabligo por diversaj praktikaj profesioj.

Tre bela tasko, sed samtempe plena da malfacilaĵoj kaj peniga laboro. Kiel devas ĉiu el ni serĉi bonan instruon, kiel do estas necesa al ĉiu el ni vera reciprokeco kaj

frata unueco kaj kolegeco (kamaradeco), tia kolegeco, kiu ne diferencigas unu de la alia, tia kamarada samideaneco kiu ne distingas la pli altrangajn kaj malpli altrangajn, la ĉefulojn kaj subulojn, la junajn kaj maljunajn, k. t. p., sed kiu nin ĉiujn per la sama amo ĉirkaŭprenas kaj nin ĉiujn sammezure defendas kontraŭ ĉiuj eblaj atakoj!

Kiom da gekolegoj klinis jam malkuraĝigitaj la kapojn, kiom da ili staris jam sur la rando de l'abismo de la malespero, kiam anstataŭ per merita rekompeco oni regalas ilin per plej nigra maldankemo, kiom da doloraj sopiroj elŝprucis jam el niaj brustoj plenegaj je ĉagrenego pro la malrespekto kaj malŝatemo, kiu estas tiel ofte nia sola doto!

Kaj ĵus en tiuj cirkonstancoj, en tiuj krizaj momentoj ekaperas la kamarada samideaneco, venas la organizo kaj krias al ni en la orelojn: « La kapojn alten, vi malkuraĝuloj! »

Jes, karaj gekolegoj! En nia komuna organizo estas vivo kaj forto. Jen instigas, kuraĝigas kamarado la kamaradon, kiam unu aŭ alia komencas malesperi, jen verŝas kolego al kolego la sanigan likvoron de la konsolo en lian spiriton kaj revekas la esperon je pli bona kaj feliĉa estonteco, pri kiu ni ĉiuj senescepte revas.

Hodiaŭ ni ĉiuj jam eksentas, ke ne sufiĉas nura organizo mallarĝa, ni diru eble pli kompreneble organizo nacia, genta. Hodiaŭ ni ĉiuj estas jam firme konvinkitaj, ke estas necese kunigi ĉiujn samprofesianojn, samcelanojn de la tuta mondo kaj krei komunan organizon, ĉar tion postulas la intereso de la tuta « *homaro* ». Hodiaŭ ni ĉiuj fariĝas laŭ certa vidpunkto kosmopolitoj sciante, ke ni ĉiuj estas devigataj reciproke interrilatiĝi ne pripensante pri tio, ĉu ni naskiĝis Bohemoj aŭ Germanoj, Francoj aŭ Angloj. Rusoj aŭ Japanoj k. t. p. kontraŭe, ni ĉiam nur devas laŭte proklamadi, ke ni estas anoj de la sama unuiĝo, idoj de la sama patrino, kies nomo estas « *homaro* ».

Tiel pensadi devigas nin la sperteco kaj la realeco tiel agi instigas nin nia propra konscienco.

Kiel esperantistoj ni des pli bone komprenas la signifon kaj la gravecon de la ideo de l'homara reciprokeco kaj de komuna alproksimiĝo de l'homaro en ĉiuj eblaj rilatoj.

Nia granda movado ideo, kies ĉefan substancon ni trovas en mirinda verko de nia glora majstro, en «Esperanto», nin leviĝas alten super la vulgarecon kaj vidigas al ni novajn horizontojn kaj celadojn

Nia I. A. I. estas la nomo de tiu ĉi organizo kaj nia I. P. R. estas ĝia organo.

Ni ĉiuj aliĝu kiel membroj al tiu ĉi asocio kaj inter-esigu pri ĝi ankaŭ niajn gekolegojn ĝis nun neesperant-istajn.

Sed ni ankaŭ fervore laboru por nia revuo kiel konstantaj korespondantoj, ĉiu laŭ sia povo kaj instruiga estas la enhavo de nia revuo, des pli da intereso ĝi ekvekos en la mondo, kaj des pli granda estos ĝia sukceso.

Do ni laboru !

STAN. OTRUBA,  
lernejestro  
en Fèšetice-Olomouc  
Moravio Aŭstrio

---

## Esperanto ĉe la Lernejo.

POR LA GEPATROJ.

La novembra numero de l' Bulteno de F. S. P. E. publikigis leteron de S-ro Rousset (1) al la gepatroj de siaj lernantoj.

Ĉar la afero interesas ankaŭ niajn ne francajn kolegojn, mi tradukis por ili la leteron de S-ro Rousset. Eble gazetistoj juĝon ĝin represinda.

«Kun multaj geinstruistoj de departemento «Rhône», kaj dank'al bonvola apogo de miaj estroj mi decidis instrui Esperanton al miaj lernantoj, do al via filo.

(1) Instruisto en Cours (Rhône) Francujo.

« Vi ne ignoras tion, kio estas Esperanto. Tiu lingvo *internacia* parolata kaj skribata de miloj da personoj en ĉiu mondpartoj, ne estas farita, kiel kelkaj supozas, por anstataŭi la naciajn lingvojn nune parolatajn. Kredition estas naiveco. Esperanto estas *helpa* lingvo tre facile lernebla, samtempe kiam la franca nia patra lingvo.

« Ĉiuj lernantoj daŭrigantaj siajn studadojn ĉe la superaj lernejoj unuagradaj, la liceoj, kolegioj normalaj, lernejoj, k. t. p., lernas almenaŭ unu nacian lingvon, la anglan, la germanan aŭ alian. Esperanto estas *multe pli facila*, ol iu ajn lingvo nacia, kaj pro tio oni povas ĝin instrui ĉe la elementa lernejo. Esperanto estas *pli utila*, ol fremda lingvo, ĉar ne nur Esperanto estas parolata en pluraj landoj, sed ĝi radias ĉe ĉiujn popolojn. La infanoj, kiuj lernos la lingvon internacian, posedos ilon multe pli valoran, ol povas esti la malplena scio de fremda lingvo. Tial mi sentas instruante Esperanton al miaj lernantoj, ke mi donas al ili ion, kiun bedaŭrinde mi ne ricevis en la elementa lernejo, eĉ ĉe la normala.

« Kia estas do por via infano la graveco de Esperanto je la vidpunkto instruado kaj edukado?

1° En la estonteco via infano povos *utiligi la esperantajn servojn* ĉu por li persone, ĉu por firmo aŭ administracio, de kiu li estos oficisto.

« 2° La esperanta lernado funkciadigas diversajn intelektajn kapablojn : observadon, analizadon, pripensadon, kaj, same kiel iu ajn studado, la esperanta lernado *igas la infanojn pli inteligentaj, igante ilin pli kleraj* : ĝi estas bonega intelekta gimnastiko, kiu plue estas interesa.

« 3° Esperanto malfermas al knabo-lernanto novajn horizontojn : li povas legi belajn paĝojn tradukitajn el fremdaj verkistoj, li ekkonos la geografion kaj historion de landoj pli malpli proksimaj, dank'al leteroj aŭ poŝtkartoj ofte ricevitaj de mi kaj de kamaradoj. Eĉ li mem povos *korespondadi* kun fremduloj. Tiel *li amigos Francujon kaj Francojn*.

« 4° Sed la plej grava afero estas la jena :

« *Por lerni konvene Esperanton li devos samtempe lerni nian belan francan lingvon.*

« Infano rediris al mi vortojn de sia patrino, kiu respondis al peto por lerni Esperanton :

« — Lernu unue la francan lingvon !

« Mi respondas al tiuj vortoj pli malbonintencaj, ol pripensitaj : « *Mi decidis instrui esperanton al miaj lernantoj, por ke pli inteligente kaj facile ili lernu la francan lingvon.* ».

Eble la aludata patrino sendos sian filon ĉe la liceon, kie li kredeble lernos la latinan kaj la grekan lingvojn ! Kial ? Car tiuj lingvoj estas la fundamento de la franca. Nu, kiel diris S-ro Boirac, Rektoro de la Dijona Akademio : *Esperanto fariĝos la latina lingvo de la demokratio* ». Per Esperanto, malgranda elementulo instruiĝas, kiel liceano.

« Demandu la plenaĝulojn, kiuj akurate vizitas esperantajn kursojn : ĉiuj respondos, ke lernante Esperanton ili relernas la *francan gramatikon*, kaj eĉ komprenas iajn malklaraĵojn de nia lingvo. Via filo agos, kiel ili : tradukante esperantajn tekstojn li skribos multe da francajn vortojn, de kiuj li scios sencon kaj ortografion. Tiaj ekzercoj faros al li samajn servojn kiel la servoj farataj ĉe la liceo dank'al tradukadoj de lingvoj klasikaj kaj modernaj.

« Mi esperas ke vi estas nun konvinkita pri la utileco de Esperanto por via filo. Tiŭ lernado estos farata *en la klaso por helpi al la lernado de la franca lingvo* ».

La tradukinto povas nur aldoni, ke tian leteron la Esperantistoj devas legigi al ĉiuj gepatroj nunaj kaj estontoj. Tiel estu !

F. DURIEUX.

---

## Lerneja steleto.

Kreskis en la arbaro ia pineto. Ŝajne ĝi estis kontenta pri sia vivo ĝis tiu tempo, kiam venis arbaron la homoj, kiuj dehakis la arbeton, kuŝigis ĝin sur la glitveturilon kaj veturigis al la lernejo.

Baldaŭ venis lernejon kelkaj pliaĝaj knabinoj, kiuj antaŭe estis instruataj en la lernejo. Ili do venis por ornamati la pineton. La ornamaĵoj estis multaj, multegaj kaj ĉiuj ĉi estis faritaj per la manetoj de la gelernantaro dum kvar antaŭkristnaskaj semajnoj.

Komence oni pretigis multe da mallarĝaj branĉetoj, vato, lino, elblovitaj ovŝeloj, pajleroj kun spikoj, kolora papero, maldika kartono, rubandoj, gelateno, betula krusto, nukŝeloj, pomoj, strobiloj, arĝenta kaj ora papero kaj gumo. El mallarĝaj branĉetoj oni faris diversformajn korbetojn, potetojn, salujojn kaj kornetojn. Vaton oni uzis por fari maljumulojn, kaj pupojn. El pajlo kaj fadenoj oni ellaboris steletojn, kupojn kaj araneojn. Bombonujojn, lanternetojn, saketoj kaj kornetojn oni faris, uzante la kartonon, diverskoloran paperon kaj silkon. Arĝent- kaj orpapero estis uzataj por dikaj kaj maldikaj ĉenoj.

Ĉion oni pendigis sur la pineton. Krom tio la supron de la arbedo oni ornamis per la grenspikoj, sub kiuj oni pendigis la grandan stelon kun bele pentritaj rubandoj. En la malsupron de la arbedo oni enstarigis la malgrandan brutejon kun Diinfaneto, Dipatrino kaj sankta Jozefo. Apud kribeto (manĝujeto) en tiu ĉi brutejeto oni povis vidi la brutaron kaj ĉe la sojlo kelkajn paŝtistojn, kiuj la unuaj venis por honorigi kaj laŭdigi Jezuon.

Fine oni pendigis je la branĉetoj arĝentumitajn kaj orumitajn nuksojn, strobilojn de pino, abio kaj piceo, ĵetis tien kaj ien pecojn da musko kaj vato kaj alpendigis la kandelojn, inter kiuj oni disĵetis la orajn kaj arĝentajn fadenojn.

La arbara pineto fariĝis kiel kristnaska arbedo, sed pri tio ĝi nenion sciis...

\* \* \*

La sesa horo posttagmeze. La plej granda ĉambro en lernejo estas jam plenigita de gepatroj, gastoj kaj geïnstruistoj de aliaj lernejoj Ĉiuj rigardas la pineton bele ornamitan kaj la panoramon, konsistantan el



pentrita sur tolo urbo Betleemo, al kiu kondukas sabla vojo. En la flanko inter maltaltaj montetoj, faritaj el papero, oni vidas la brutejon, en kiu laŭ Biblio naskiĝis Kristo. Proksime la paŝtistoj paŝtas la lignajn ŝafetojn. La spaco inter panoramo kaj pineto estas ŝirmita per larĝa tolo, je kiu aperos dum la prezentado la lumbildoj.

Venas la geknabaro, kiu kolektiĝis en ilia ĉambro kaj sidiĝas sur longajn benkojn. La ĉeestantaro rigardas la gajajn vizaĝojn de la infanaro. Venas la ĉefinstruisto. La gelernantaro stariĝas kaj kantas malnovan religian polan kanton :

Kto sie w opieke podda swemu...

(Kto sje v opjeke podda Panu svemu)

Kiu fordonas sin je la zorgo de Dio...

Kiam la kanto estas finita, oni aŭdas la klaran voĉon de instruisto, kiu stariĝas inter gelernantaro kaj tiel diras :

Post kelkaj tagoj la balanciontaj en preĝejturoj sonoriloj disanoncos en la vasta mondo la ĝojplenan sciigon. La nuda kaj malgaja pola tero ĝojiĝos per la kristnaskaj kantoj, kiujn la homoj ĉu en preĝejoj, ĉu en domoj ekkantos. En tiuj ĉi religiaj kantoj oni ekaŭdos, ke antaŭ multaj, multegaj jaroj en malproksima lando naskiĝis Diinfano. Tio fariĝis, kiam en la lando regis la malamo. Kristo komprenis, ke la malamo estas la plej granda malamiko de homa feliĉo. Li deziris, por ke la homaro estu feliĉa kaj tial li predikis la amon, trairante la vilaĝojn kaj urbetojn.

Kion ni devas ami ? Ĉion kio estas bona, bela kaj pura. Ĉion, kio estas nobla, alta kaj supera. Ni amu nian teron, niajn kampojn, herbejojn kaj arbarojn. Ni amu ĉiajn bonajn homojn, iliajn noblajn morojn, iliajn kantojn.

Ni amu ankaŭ niajn malnovajn paŝtistajn kristnaskajn kantojn, kiujn ni tuj ekkantos.

— Post momento la infanaro stariĝas kaj kantas :

Aniol pasterzom mowil, Chrystus nam sie narodzil...

(Anjoŭ pasteĵom muviŭ, Ĥristus nam sje narodziŭ).

La anĝelo al paŝtistoj diris, Kristo al ni naskiĝis...

Kiam la kantado finiĝis, eliris ia knabeto, kiu rakontis la legendon, ke al brutejo, kie naskiĝis Jezuo, venis multajn homojn, inter kiuj oni povis rimarki ankaŭ la polojn nacie vestitajn, venintaj el diversaj partoj de Polujo. Diinfaneto aŭskultis iliajn kantojn kaj rakontojn atente, ĝojis aŭdinte la bonan sorton de ilia vivo kaj fine ekploris, kiam oni rakontis pri diversaj malfeliĉoj, kiuj bedaŭrinde ĉe ni okazas.

La unua eliris la loĝanto de Karpataj montoj (kiam li estas anstaŭita de iu knabo, aperis sur la toko la lumbildo kun Karpataj montoj kaj kun ĉi tieaj tipoj) kaj en versoj laŭdis sian landon kaj rakontis al Jezuo la interesplenajn okazintaĵojn el vivo de la montanoj.

Norde de Karpataj montoj kuŝas urbo Krakovo kaj post momento la lumbildo de ĝi aperis sur la tolo. Samtempe eliris knabo kaj knabino kaj interparolis pri la antikvaĵoj de la urbo. La dialogo estas tiel konstruita, ke preskaŭ ŝajnis al ĉiuj, ke efektive tio okazis antaŭ Diinfaneto.

En la plua daŭro de la prezentado oni vidis multajn aliajn bildojn de diversaj partoj de Pollando kaj aŭdis diversajn versaĵojn kaj rakontojn. Oni do rigardis Vistulon, Varsovion, Baltikan maron, naciajn tipojn k. t. p. Iasoje geknabaro kantis je unu, du, tri kaj eĉ kvar voĉoj.

Fine iu el la gepatroj parolis kaj dankis la instruistojn, deziris al ĉiuj « bonan sorton » dum la venonta novjaro kaj oni disdonis al ĉiu infano po du pomoj, unu mielkuko kaj po kelkaj nuksoj.

\* \* \*

La pineto staris silente, kvazaŭ ĝi ĉion atentis kaj komprenis. . Bedaŭrinde !...

N.B. Kompreneble la programo de «lerneja steleto» en nova jaro estos tute alia.

Teofil Adam Koziara  
Varsovio.— Polujo.

## ***Konsoliĝu !***

Ne tro forta muro, roko.  
Nek pordego, nek remparo,  
Eĉ giganta pafegilo —  
Kiujn la potenca voko  
Ne disrompus por utilo  
De l'homaro.

JAN KASZYCKI

Grzegorzki-Galicio-Aŭstrio

---

---

## **Esperantista Universitato en Francujo**

Nur tiam Esperanto definitive venkos, kiam intruantoj kaj lernantoj sur la tuta terglobo komprenos la nepran neceson de internacia lingvo por faligi ĉiujn intelektajn kaj moralajn barojn inter la homoj kaj certigi la alvenon de internacia frateco kaj universala paco. Estus do tre dezirinde, ke ekzistu, en iu lando, Universita centro, al kiu povus sin turni ĉiuj Esperantistaj studentoj en la mondo por konvene tie interkonatiĝi, kaj prepari la varbadon al Esperanto de ĉiulandaj Universitatoj kaj de tutmonda junularo.

Sed ĉu tia centro ne jam ekzistas, almenaŭ en unu Universitato t. e. la franca Universitato de Dijon, kies rektoro estas ja sufiĉe konata de ĉiuj Esperantistoj, Sro *Boirac*, Prezidanto de la Esperantista Lingva Komitato ? Al tiu sama Universitato apartenis ankaŭ la granda matematikisto Profesoro *Meray*, bedaŭrinde mortinta antaŭ du jaroj, kiu tiel kuraĝe penadis por disvastigi Esperanton inter la franca sciencularo, kaj kies nomo restos por ĉiam ligita kun la historio de Esperanto en Francujo. Ankaŭ tie estas unu el la plej malnovaj Esperantistoj, Profesoro *Lambert*, nun dekano de la literatura Fakultato, kiu verkis tre rimarkindajn librojn en Esperanto, kaj kies esperantista fervoro baldaŭ reŝamigos, se li povus vidi Esperantistojn veni grandanombre al Dijon por viziti la kursojn de lia Fakultato.

Tiuj vizitantoj estus des pli bone akceptataj, ke la Dijona Universitato jam de longe organizis kursojn por fremduloj, al kiuj venis dum la ĵus pasinta jaro ne malpli ol 250 studentoj el ĉiuj partoj de la mondo. Sekve ĉio estas pretigita en la Universitato kaj en la urbo por garantiĝi al la alilanduloj plej bonan kaj fruktoportan ĉeestadon. Krom la ĝeneralaj kursoj pri *juro, filozofio kaj filologio, sciencoj kaj medicino*, dekkvin horoj da specialaj kursoj difinitaj por fremdaj studentoj okazas ĉiujare dum la studaj duonjaroj kaj plie, somerkursoj organizitaj de Komitato de patronado por fremduloj, kun la helpo de la Universitato, okazas dum la libertempo, de la komenco de Julio ĝis la fino de Oktobro. La nomita komitato organizas ankaŭ plezurajn ekskursojn tra la regiono, kiu estas tre riĉa je naturaj kaj historiaj vidindaĵoj, kaj zorgas pri la komforta loĝado kaj vivado de la Universitataj gastoj.

Cetere oni povas sin turni por ĉiuj sciigoj, ĉu al la Rektoro de la Universitato, ĉu al Profesoro *Lambert*, kiu estas ankaŭ Generala Sekretario de la Patrona Komitato por fremdaj Studentoj. Ni esperas do, ke baldaŭ oni povos montri al la skeptikuloj vere Esperantistan Universitaton, kiu estos ekzemplo al ĉiuj ceteraj Universitatoj por la starigo de internaciaj rilatoj en la tutmonda intelektularo dank' al Esperanto.

---

---

## Unuigo de la Asocioj Internaciaj

— —  
CENTRA OFICEJO :

Bruselo (Belglando), 3bis, rue de la Régence.

— —

**Dua tutmonda kongreso de la asocioj internaciaj  
Gento-Bruselo, 15-18 de Junio 1913.**

— —

### PROGRAMO :

UNUA SEKCIO. — *Kunagado, komunaj entreprenoj.*

A. — Ekzameno de la deziroj kaj projektoj rilatantaj al la kunagado inter la asocioj internaciaj.

B. — Komunikado de la deziroj de la asocioj unuj al la aliaj. Kodo ĝenerala de la deziroj de la kongresoj. — Apogo donota de ĉiuj asocioj al la deziroj je karaktero ĝenerala.

C. — Praktikaj aranĝoj por malvolvi la Centron Internacian kaj donaci al ĝi lokejojn, materialajn instalaĵojn kaj taŭgajn kolektaĵojn por ĝiaj servoj.

DUA SEKCIO. — *Regularo. -- Leĝaro.*

A. — Projekto pri traktato kaj pri internacia regularo rilate al la regulo internacia kaj eksternacia de la Asocioj.

B. — Kiel la Asocioj internaciaj povas kunhelpi al la malvolviĝo de la internacia juro, formante modelajn kontraktojn internaciajn je kiuj povas libere referenci la partioj kontraktintaj. — Kolektado kaj publikigado en kodo de tiuj kontraktoj.

C. — Rolo de la Asocioj en Organizo internacia. — Loko donota al ili en tutmonda Konstitucio fiksanta la rilatojn de la Ŝtatoj inter ili kaj la senpera reprezentado de la sociaj funkcioj komunaj al ĉiuj landoj. La deziroj de la Asocioj internaciaj al la proksima Konferenco de la Paco en Hago.

TRIA SEKCIO. — *Unuformigo de la sistemoj de unuoj.*

Rimedo por alligi al ĝenerala sistemo, la specialajn sistemojn de unuoj kaj por certigi estontan unuformigon.

KVARA SEKCIO. — *Organizado de la Asocioj kaj de la Kongresoj.*

A. — Diversaj rimedoj por pligrandigi la utilecon kaj la efikecon de la Asocioj internaciaj kaj de la Kongresoj internaciaj. — Facilaĵoj donotaj al la Asocioj internaciaj de la administracioj de la Poŝto, de la Telegrafo, de la Fervojoj kaj de la linioj de Ŝipveturado. Karto internacia de memeco.

B. — Praktikaj rimedoj por obteni la efektivigon de la deziroj de la Kongresoj. Transdono de la decidoj al la ŝtatoj; ilia aliigo en leĝojn internaciajn.

C. — Preparo de modela regularo pri la laboroj kaj la diskutadoj de la internaciaj kunvenoj.

D. — Rimedoj por certigi la partoprenon de ĉiuj ŝtato en la Asociaj internaciaj. Organizo de la nacia reprezentado en la Asocioj internaciaj.

E. — La ideala budĝeto de la Asocioj ; kion ili povus fari se ili disponus pri adekvataj financaj rimedoj.

KVINA SEKCIO. *Dokumentado kaj eldonaĵoj. Ekspozicio kaj Instruado.*

A. — Kiel organizi la eldonaĵojn sciencajn, teknikajn kaj sociajn, tiamaniere por pligrandigi ilian disvastiĝon kaj por plimallargigi la ligilojn de la intelekta kunagado internacia. Ĝeneralaj rekomendoj por la starigo de eldonaĵoj (formato, enklasigo, k. t. p.)

B. — Prenotaj aranĝoj de la Asocioj internaciaj por en ĝi organizi la parton de la dokumentado kiu rilatas al ili. Praktikaj informoj pri tio.

C. — Projekto pri Unuiĝo Internacia por la dokumentado.

D. — Projekto pri Universitato internacia kien estus invitataj por profesii kelkatempe la eminentaj personoj de ĉiuj universitatoj kaj celanta la elfinon de la studoj de la eminentuloj ĉiulandaj. Partopreno de la Asocioj internaciaj en tia Universitato.

E. — La plej bona utiligo de la Ekspozicioj internaciaj kaj tutmondaj, por disvastigi la movadon por la organizo de sekcioj internaciaj en la ekspozicioj ; sistema organizado de la kongresoj kunvenintaj je la okazo de la ekspozicioj.

SESA SEKCIO. *Lingvo Scienca kaj teknika.*

A. — Esprimado de principoj ĝeneralaj servontaj kiel fundamento por la starigo de terminologiaj kaj nomaraj sistemoj.

B. — Determino de la uzado de lingvoj en la interrilatoj internaciaj.

N. B. Niaj legantoj estas insiste kaj afable petataj sendi al mi, kiel eble plej baldaŭ, siajn rimarkojn, precipe je vidpunkto esperanta, pri la supre cititaj punktoj Ĉiuj

ricevitaj rimarkoj servos por verki ĝeneralan raporton, kiun mi prezentos kiel delegito de I. A. I., al la kongreso. Ĉiuj helpu, ĉar tiu kongreso estas la plej grava por la fino venko de Esperanto.

J. JACOBS  
Boomsche Steenweg, 444  
Antverpeno-Belgujo

---

## Pri kunedukado

Ĉiulandajn instruistojn, profesorojn, edukistojn, kaj interesigantajn pri Edukado personojn mi afabla petas ke ili bonvolu al mi sendi kiel eble plej baldaŭ respondojn pri la jenaj demandoj :

1° Ĉu en via tuta lando oni kunedukas knabojn kaj knabinojn ? Ĉu nur en unu parto ? en kiu ? Ĉu en via regiono, en via urbo ?

2° De kiam ekzistas tiu kunedukado ?

3° Kiel ĝi estas organizita ?

4° Ĉu la gepatroj konsentis kaj konsentas ĝin facile ? Malfacilaĵoj renkontitaj por ĝin starigi.

5° Kiaj estas la rezultatoj pri la vidpunktoj morala, intelekta, k. c. ?

6° Kiaj estas la rilatoj inter knaboj kaj knabinoj en la korto kaj ekster la lernejo ? Ĉu ili partoprenas kune iajn ludojn k. c. ? Ĉu enklase ili estas intermiksitaj, ĉu alterne lokitaj, ĉu laŭ du fakoj apartigitaj ?

7° Kion opinias pri kunedukado viaj ĉefaj pedagogoj, vi mem ? ĉu ili ? ĉu vi ĝin opinias supera rilate al la disedukado ? Kial — Ĉion pluan, kion interesa vi juĝos, mi petas ke vi aldonu al viaj respondoj.

Tiun materialon, kiun vi bonvolos disponigi al mi, mi uzos por verki artikolon, kies publikigon mi petos de la gazetoj «I. P. R.» kaj «Esperanto» kaj de franca faka instruista gazeto. Tiel mi esperas pruvi unufoje plie al miaj tutmondaj kaj francaj kolegaj la taŭgon de nia lingvo.

Esperante baldaŭajn respondojn, mi kore antaŭdankas miajn afablajn respondontojn kaj certigas pri mia preteco ilin miavice servi.

**A. GIRAUD**

2, rue du Nil, 2<sup>me</sup>  
**Marseille**

---

---

## *Grava peto!*

Mi estus feliĉa ricevi de ĉiulandaj gekolegoj informojn pri bone elprovitaj metodoj de l'instruado pri geografio laŭ reliefaj kartoj geografiaj.

Precipe mi ŝatus ricevi respondon al la sekvantaj demandoj.

1. Ĉu oni uzas en viaj lernejoj la reliefajn kartojn geografiajn ĝenerale kaj devige aŭ nur laŭvole en kelkaj lernejoj?

2. Ĉu la ĝelernantoj mem faras reliefojn, kaj ĉu ili sukcesas?

3. Kiamaniere ili faras tiujn reliefojn?

4. Ĉu ankaŭ la ĝelernantoj havas reliefajn kartojn geografiajn anstataŭ tute simplaj kartoj nereliefaj?

5. Se jes, kie oni povas similajn karton reliefajn ricevi?

6. Ĉu vi bonvolus afable priskribi kompreneble la manieron de la fabrikado de tiuj reliefaj kartoj geografiaj, kaj ĉu tiuj kartoj estas vere rekomendindaj ĉe la instruado?

7. Ĉu Vi havas eble iajn proprajn spertojn rilate al tiu ĉi punkto? Mi petas sendi la eventualajn respondojn en letero adresita :

STAN OSTRUBA,  
lernejestro en

Fešetice-Olomouč Moravio-Aŭstrio.

---

---

## *Diversaj komunikoj*

*Internacia Esberantista Semajno-Kongreso* okazos en Gent, okaze de la Universala Ekspozicio en tiu urbo, de la 14a ĝis la 20a de Aŭgusto 1913. La prezo de la kongreskarto estas 1 Sm. Jam pli ol 200 geesperantistoj sendis aliĝon. Tiu ĉi numero de I. P. R. enhavas aliĝilon.

*3a Tutaŭstria Esperanto-Kongreso* chazos en Graz de la 10a ĝis la 13a de Majo 1913. Kongreskarto kostas 1.700 Sm. (Gvidlibro senpage par la kongresanoj). Por pluj informoj oni sin turnu al la Loka organiza Komitato, Wielandgasse, 42 Graz VI.

*Internacia Konkurso de Stampoj* organizita de « Olota Stelo ». Oni sendu la stampojn antaŭ la 1a de marto 1913,



stampitajn sur kartoneto laŭ formato poŝtkarto Oni petas samtempe sendi ĉiajn esperantaĵojn por ekspozicio — Sin turni al Sro Pere Roque, Pardal, 13, Olot, Katalunujo — Hispanujo.

---

## **Novaj membroj, kiuj aliĝis antaŭ la 10an de Februaro 1913**

- 115 Sro J. Rousset, Cours (Rhône-Francujo) Sm. 1.—  
116 Sro Jozefus Chant Lipes, 880 Bedford Ave., Brooklyn, N. Y. (Usono) I.—  
117 Fino Adela Šefer, Gloucester Crescent, 8, Regent's Park, N. W. London (Anglujo) I.—  
118 Moskva Societo Esperantista, Lubjanskij per 3, kv. 34, Moskvo (Rusujo) I.—  
119 Fino Klavdija Andreevna, Rojdestvenskaja, St. Golicino, dev. Zaharovo, Aleks. ĵ. d. (Rusujo) I.—  
120 Sro Dreŭsicke, Koernerstr. 6111, Kassel (Germanujo). I.—  
121 Sro H. Schmiedeberg, Delitsch (Germanujo) I.—  
122 Sro K. A. Wiherlehto, Kärppälä, (Finlando-Rusujo) I.—  
123 Sro Pawlik Czestaw, Radwanice, polska szkola (Silezio-Aŭstrio) I.—

## **Malnovaj membroj, kiuj jam pagis sian kotizon por la jaro 1912-1913.**

20, S-ro Walter B. Currie (1 Sm); 30, S-ro A. Richardson (1 Sm); 62, S-ro A. Ruche (1 Sm); 8, F-ino M. Hubert (1 Sm); 78, F-ino E. Tegoni (1 Sm); 66, S-ro A. Koziara (1 Sm); 77, S-ro L. Borkowski (1 Sm); 29, S-ro E. Elenius (1 Sm); 21, S-ro J. E. Heilmann (0,980 Sm); 41 S-ino H. Zapater de Chalmot (1 Sm); 51, S-ro Fr. Drudin (1 Sm); 4, S-ro J. Camescasse (1 Sm); 33, S-ro N. C. Carlsen (1 Sm)

---

## **Monoferoj**

S-ro A. Koziara (0.480 Sm.) S-ro E. Elenius (0.460 Sm); S-ro Fr. Drudin (0.500 Sm.)

---

## **Venditaj**

1 Kantaro de Sro Rouveret (0,120 Sm) al S-ro A. Koziara; 1 libro de S-ro Maréchal (0.500 Sm) al S-ro E. Elenius;

## BIBLIOGRAFIO

*Katalogo de Moskva Librejo «Esperanto».* 26, Tverskaja, Moskvo, Ruslando (6a eldono Januaro 1913).

*Verzeichnis der Esperanto-Literatur* (Katalog nr 1 -- Januar 1913). Ader & Borel, G. m. b. H., Esperanto-Verlag, Dresden-A. 1 — Struvestr. 40, Germanujo.

*La Mistera Sinjorino*, novelo originale verkita de René Beck. — Eldonita de Librejo Asselin, 7, Avenue de Grammont, Tours, Franclando. — Prezo: 0,200 Sm.

*Universala Leterafranko.* -- Raporto al la IIIa Kongreso de U. E. A., Krakow, 11-18 Aŭgusto 1912) verkis supera poŝtpraktikanto Arnold Behrendt. Maxstr., 22. Breslaŭ (Silezio, Germanujo).

*Preisliste der Erste Wiener Versand-Unternehmung «Esperanto» für Hausbedarfsartikel.* — Wien IV, Wiedner Hauptstrasse, 51, (Vendejo de la «Esperanto» alumetojn)

*Lernolibro de la plej simpla kaj plej efika Esperanta Stenografio* de Ludoviko Jakab — 1a parto, elementa Stenografio (manuskripto) — N° I de la Internacia Stenografia Biblioteko — Mendebla ĉe la verkisto: I. Mészáros-utca 19, sz., Budapeŝt (Hungarujo). Prezo: 0,200 Sm.

*Pri Estetiko en Medicino* de Dro Heliodor Swiecicki el pola lingvo tradukis Sro Mieczyslaw Czerwinski. — N° I de la T. E. K. A. Biblioteko. — Eldonejo de «Kuracisto», str. Szopena, 1, Warszawa, Ruslando. — Prezo: 0.300 Sm.

La libro pritraktas laŭ tre interes iga maniero tute neordinaran temon: ĝi precipe celas vekti en la koro de kuracisto pli grandan amon al la profesio. La traduko estas entute tre laŭdinda.

*Kion patrino povas suferi*, novelo, originale verkita en flandra lingvo de Hendrik Conscience; esperanta traduko de Frans Schoofs: — Eldonejo de «Belga Esperantisto», Vondelstraat, 20, Antwerpen, Belglando. Prezo: 0.200 Sm.

Jen alia novelo de la plej granda flandra literaturisto de la XIX jarcento kiu pliriĉigas nian Esperantan libro-trezoron. Tre kortuŝa estas la priskribo de la mizero de malriĉuloj dum la vintro kaj precipe la anim-sufero de patrino kies infanoj estas mortantaj pro malsato. La traduko estas bonega kaj la legado de la libro plej rekomendinda.

### ATENTU GRAVEGE!

Por ne malhelpi la regulan funkciadon de nia asocio kaj la regulan aperadon de la revuo, la malnovaj membroj estas petataj *senprokraste* sendi sian kotizaĵon.

LA KASISTO.

**LUEBLA**

— NORVEGA  
ESPERANTISTO —

Dumonata oficiala organo  
de Norvega Esperantista Ligo.

8 p., Esperante & Norvege.

Jara abono : 2,00 kr. (1.100 Sm)

Adm. :

Bergsliengate, 11, Kristiania.

---

POŝTA ESPERANTISTO

Monata, oficiala organo de la  
Internacia Ligo de

Esperantistaj Poŝtoficistoj

(Ildepo)

Jare : 1 Sm. Oni sin turnu al :

Arnold Behrendt

Maxstr., 22, Breslau. Germanujo

---

— BRAZILA  
ESPERANTISTO —

Monata oficiala organo de  
Brazila Ligo Esperantista

8 p., Esperante & Portugale.

Jarabono : 5 fr. (2 Sm)

Adm. :

Avenida Rio Branco 155-2º  
Rio de Janeiro. — Brazilujo.

---

SVISA ESPERO kaj  
MONDA POŝTO

Duonmonataj oficialaj organoj  
de la Svisa Esperanto Societo  
alternante aperantaj, kun la mo-  
nata aldono La Kolektanto por  
ĉiuspecaj kolektantoj.

Helpa kaj Propaganda Organo  
de la

*IXa Universala Kongreso de  
Esperanto en Bern 1913*

---

## Avizo al la verkistoj kaj eldonistoj

Se vi vere deziras ke viaj verkoj kaj eldonaĵoj estu kiel eble plej multe vendataj, anoncu ilin en nia revuo. Viaj anoncoj estos legataj de niaj gemembroj, kiuj ĉiuj estas ne nur fervoraj esperantistoj, sed ankaŭ *instruantoj* de Esperanto. Al ili estas do komisiita konigi viajn verkojn kaj eldonaĵojn.

Gemembroj verkistoj, profitu de la speciala rabato : neniuj alie gazeto oferas al vi tiel profitigajn kondiĉojn !

Gekolegoj, varbu anoncantojn !

## BELGA ESPERANTISTO

—  
Oficiala monata organo de  
Belga Ligo Esperantista.  
24 p. Esperante,  
Jara abono : 5 fr. (2 Sm.)  
Adm. : 20, Vondelstraat.  
— Antwerpen —

---

## — THE BRITISH ESPERANTIST —

Oficiala monata organo  
de Brita Esperantisto Asocio  
20 p., Esperante & angle  
Jara abono : 3 ŝiling (1.500 Sm.)  
Sin turni al la sekr. de B. E. A.  
133-136 High Holborn. London.

---

## — LA ONDO DE ESPERANTO —

Monata gazeto kun  
senpaga literatura aldono.  
20 p. Esperante & ruse  
Jara abono : 2 rubl. (2 120 Sm.)  
Adm. : « Librejo Esperanto »,  
26, Tverskaja, Moskvo, Rusujo.

---

## GERMANA ESPERANTISTO —

—  
Duonmonata gazeto  
Propaganda kaj literaturo  
16 p., Esperante & germane.  
Jara abono : 4.50 M. (2.250 Sm.)  
Eldonejo : Ader & Borel  
Dresden — A. I. Struvestr., 40.

## AMERIKA ESPERANTISTO

—  
Oficiala monata organo de  
Esperantista Asocio de N.-A.  
16 p., Esperante & Angle.  
Jara abono : 2,500 Sm.  
Adm. : 607, Fifteenthstr., N.W.  
Washington, D. C.

---

## LA LANGUE INTERNATIONALE

—  
Monata revuo  
12 p., Esperante & france  
Jara abono : 1.40 fr. (0.500 Sm.)  
Adm.  
39, Grande Rue, Louhans.

---

## — GERMAN-AŬSTRIA ESPERANTISTO —

—  
Monata gazeto  
8 p.; Esperante & germane  
Jara abono : 3 K. (1,250 Sm.)  
Adm. : VI, Dürergasse, 9,  
— Wien —

---

SHERLOCK HOLMES EN  
SERVO  
DE LA HISPANA TRONO  
(La unua esperanta satiro)  
*Deveno kaj Historio de Esperanto*  
(Paroladoj de Dr Zamenhof)  
Ĉiu : 75 hel. (0,300 Sm.)  
Ĉe : Ĉasopis Ĉeských  
Esperantistu.  
Praha II, Diétrichova ul. 7.  
— Bohemujo —

— DANUBO —

Monata organo de la rumanaĵ  
kaj bulgaraĵ Esperantistoj  
32 p., nur en Esperanto  
Jara abono : 3.50 fr. (1, 400 Sm.)  
Adm. : 14, str., Belvedere.  
Bucuresti, Rumanujo.

---

LINGVO INTERNACIA

Centra organo de la  
Esperantistoj  
La plej malnova el ĉiuj Esper-  
antistaj gazetoj, fondita  
en 1895, aperas post la 15a de  
ĉiu monato.  
Jara abono : 5 fr. (2 Sm)

---

JUNA  
ESPERANTISTO

Monata gazeto por junuloj,  
instruistoj kaj  
Esperanto - lernantoj  
Jara abono : 3 fr. (1, 200 Sm.)  
Ambaŭ gazetoj kune : 7 fr.  
Adm. : 33, rue Lacépède  
— Paris —

---

POLA  
ESPERANTISTO

Monata gazeto kun  
senpaga literatura aldono  
Oficiala organo de la 8a  
20 p., Esperante & pole.  
Jara abono : 2.50 rb. (2.650 Sm.)  
Adm. : Hoza 20, Varsovio.

LA MOVADO

Franca esperantisto  
Monata organo de la  
francaĵ esperantistoj  
:6 p., Esperante & france  
Jara abono : 3.25 fr. (1,300 Sm.)  
Adm.: 61, Boulevard St-Marcel,  
— Paris —

---

LA HOLANDA PIONIRO

Monata oficiala organo de  
Holanda Societo Esperantista  
4 paĝa grandformata,  
Esperante & holande  
Jara abono : 1.20 fl. (1 Sm.)  
Adm. : Prinsestr., 48, Hago.

---

ITALA  
ESPERANTISTO

Monata oficiala organo de  
Itala Esperanto Asocio  
12 p., Esperante & itale  
Jara abono : 3 l. (1,20 Sm.)  
Adm. : 13, Salita Pollaiuoli.  
— Genova —

---

— TUTMONDA ESPERO —

Oficiala, monata organo de  
la Kataluna Esperantistaro. —  
16 p., Esperante & katalune  
Jara abono : 3 fr. (1, 200 Sm.)  
Adm. : str. Tallers, 81  
Barcelono. — Hispanujo